

“Eble ne” Alicio respondis iom singarde “tamen, lernante la muzikon, mi ĉiam devas tempbati.”<sup>1</sup>

“Ha, jen la kaŭzo” diris la Ĉapelisto. “Li ja ne ŝatas tiun batadon. Se vi nur volus esti pli agrabla, li preskaŭ ĉion farus pri la horloĝoj laŭ viaj preferoj. Ekzemple, ĉe la naŭa matene, kiam vi devas komenci la lecionojn, vi nur devus murmuri al li vian deziron, kaj jen la indikiloj tuj montrus la unuan horon kaj vi havus la tagmanĝon.”

“Tio estus agrabla, certege” diris Alicio. Tamen, profundiginte en pensojn, ŝi poste aldonis:

“Sed en tiu okazo, mi ja ne estus preta por la manĝo, mi ne estus malsata!”

“En la komenco, eble ne” diris la Ĉapelisto “sed vi povus teni la horloĝon ĉe la unua, ĝis vi *fariĝus* malsata.”

“Ĉu vi tiel mastrumas ĝin?” Alicio demandis.

La Ĉapelisto malĝoje svingis la kapon. “Tion ne mi” li respondis “ĉar li kaj mi malpaciis en la pasinta Marto, ĵus antaŭ kiam *tiu* frenezigis (montrante per sia tekulero al la Martleporo). Ĝi okazis ĉe la granda

<sup>1</sup> Jen alia dusencaĵo: Alicio intencis esprimi “laŭtkalkuli la taktojn,” sed la Ĉapelisto komprenis aŭ ŝajnis kompreni “bati Tempon.”

koncerto kiun organizis la K...  
devis kanti:

*Twink'l,<sup>1</sup> Twink'l! Vespere  
Kia via afereto?*

Vi kredeble konas tiun kanton

“Mi certe aŭdis ion similan”

“La daŭrigo” diris la Ĉapelisto

*Tra l' aer' vi ŝovas vin  
Majeste, kiel anasin'.  
Twink'l, Twink'l!*

En tiu momento la Glir...  
komencis dormkanti:

“*Twink'l, twink'l, twink'l.*” . . .

havis la intencon daŭrigi sen fi...  
don, oni pinĉis al ĝi la orelojn

— “Nu, apenaŭ mi finis la...  
diris la Ĉapelisto, “la Kera D...  
laŭte kriegis: ‘Li mortigas la...  
senkapigu lin.’”

“Ho, la kruela sovaĝulino”

“Kaj de post tiu tago ĝis n...  
malgaje daŭrigis “la Tempo ĉ...  
Ĉiam konstante li nun donas...  
posttagmeze.”

Vere frapanta ideo venis al...  
kaŭzo, ĉu ne, pro kiu mi vidas...  
da temanĝiloj?”

<sup>1</sup> Angla vorto kiu signifas “lumi kiel...  
intermite.”